

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W. M. Page, adv., Edinburgh.
E. Archdeacon, Paris.
Joan Gili Norta, Barcelona.
Teo Jung, Köln (Kolonjo).
G. van Heek, Hengelo.
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura redaktoro: Zanoni.

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

ADMINISTREJO:
Köln-Horrem, Reinlando, Germanio.
Poŝtĉeka konto Köln 70865, por Teo Jung, Köln-Horrem.
Manuskriptojn oni skribu nur sur unu flanko de la papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendo aŭ respondo aldonu resp.-kup. aŭ poŝtmk. Adresu ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ

ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazetoj kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazet-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.
Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrado per oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritatuloj (ne-Esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

Aperas semajne.

3 dolaroj, 7.50 guldenoj, 12 svedaj kronoj, 15 svisaj frankoj, 15 ŝilingoj, 15 danaj aŭ norvegaj kronoj, 15 pesetoj, 25 francaj aŭ belgaj frankoj, 55 liroj, 60 finnaj markoj, 75 ĉsl. kronoj, 360 hung. kronoj, 1200 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu duonjare 50 gmk., Rusio 40 gmk. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, aŭ 100 respond-kuponoj aŭ 100 germanaj markoj. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronjare 21 mk., aŭ rekte ĉe la administrado Köln Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 2.— mk.).

JARABONO

Aperas semajne.

ANONCOJ

costas po cm² (kvadracentimetro) por ĉiuj landoj 8 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. ANONCETOJ costas po 2 foja enpresoj kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezon de 1 noj de ET (1. jar-abono aŭ 1 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 noj de ET (1. jar-abono); 1 foja enpresoj costas la samon kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintoj (ĉefkunveno, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

Numero 67 :-: Edinburgh, Paris, Barcelona, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas :-: 15. Jan. 1922.

Por la Samideanoj en Ruslando.

Saluton al vi, karaj rusaj samideanoj!

Longtempe vi estis disigitaj de la tutmonda Esperanta movado, longtempe vi aŭdis nenion aŭ nur malmulton pri la progresoj kaj sukcesoj de nia kara lingvo en aliaj landoj. Dume vi laboris fervore kaj idealiste laŭ la cirkonstancoj, kaj ankaŭ vi progresigis Esperanton en la vastaj regionoj de via lando.

Sed de kelka tempo la interrilatoj ree ekfunkcias inter vi kaj ni, iom post iom vi eksentas vin denove kiel anoj de la granda rondo familia. Kaj se hodiaŭ ni dediĉas konsiderindan parton de nia ĵurnalo speciale al vi, karaj rusaj samideanoj, tio estu por vi signo, ke ni nerusaj Esperantistoj tute rekonas kaj estimas vian fervoran kaj sindonan agadon por nia komuna afero, kaj antaŭsigno tio estu, ke baldaŭ la interrilatoj plene restariĝu.


Dankon al vi, karaj rusaj samideanoj, pro via fervoro kaj idealismo, dankon pro via pacienca laboro en la estinteco! Bondeziron por la estonta tempo! Kaj por hodiaŭ koran samideanan saluton!

Rimarko de la Redakcio.

Ni ne intencas, doni en la hodiaŭa numero resumon pri la stato de nia movado en Ruslando; ĝi povus esti nur tre nekompleta. La sola kronikaio, pri kiu ni volas hodiaŭ raportiti, estas la Unua Nordrusa Konferenco Esperantista, kaj ankaŭ pri ĝi ni ne publikigos iajn rezoluciojn aŭ aliajn detalojn, sed nur interesan statistikon. Estonte, kompreneble, ni publikigos regule sciligojn pri la Esp. movado en Ruslando kaj Siberio, t. e. liujn sciligojn, kiujn ni mem ricevos aŭ kiujn ni elĉerpos el la ruslandaj Esp. gazetoj alvenontaj ĉe ni. — Sed ni publikigos hodiaŭ kelkajn eliraĵojn el leteroj kaj kelkajn literaturajn verkitaĵojn de rusaj samideanoj.

El leteroj de rusaj samideanoj.

El letero de s-o Pimenov en Staropavlovskoe: . . . kiam mi ricevis kaj ekvidis vian ĵurnalon, mi unue ne povis kredi, ke ĝi estas Esperantista



Domo de la Esperanta Biblioteko, Legejo kaj Muzeo en Saratov (lama biblioteko de Davidov).

La Esperantistaro ĝojos aŭdante, ke la fama biblioteko de Georgo Davidov, la plej granda Esp. biblioteko de la mondo, ne pereis dum la maltrankvilaj jaroj en Sovjeta Ruslando, sed ke ĝi estas nedifektita kaj bone zorgata, laŭ la cirkonstancoj. Nuntempe ekzistas sur Volga rivero eĉ moviĝanta ekspozicio de duoblajoj de ĉiuj eldonaj troviĝantaj en la Saratov'a Biblioteko sur unu el la plej bonaj survolgaj vaporŝipoj „Urlickij“.

ĵurnalo, tiom impona ĝi estas. Ricevinte antaŭ la milito multajn Esperanto-gazetojn kaj havante specimenojn de preskaŭ ĉiuj el ili, mi ne vidis ankoraŭ similan. Ĝi konatigis min denove kun la Esperanto-movado en la tuta mondo, sed — kio estas pli grava — ĝi enverŝis en mian

animon novan energion, kiu estis estingiĝonta pro soleco.

Pri la Esp. movado en tuta Ruslando mi ne povas al vi detale priskribi. Sed ĝenerale mi devas al vi diri, ke tiu ĉi movado estas tre larĝa, sed kiom ĝi estas profunda — pri tio ĉi estos

direble post kelka tempo. Estas la vero, ke ruslanda registaro rilatas favore al Esperanto (sed ne tute al Esperantismo), kvankam devigan enkondukon de la lingvo en lernejojn ĝi ankoraŭ ne dekretis. Manko de spertaj Esperantistoj-gvidantoj kaj lernolibroj kaj ĝenerala ekonomia malfacila stato tre moderigas la movadon

El letero de s-o Katalinov en Petrograd al s-o Butin, kunredaktoro de ET

. . . Komencante de 26. okt. 1921, mi ricevis de vi iom post iom viajn presajojn kaj jam poste — leteron. Entute mi ricevis ET, 2 „Brita Esperantisto“, unu „Germana Esperantisto“, unu „Verda Utopio“. Sekve tute estas konservita. Por ĉi tiu mi vin tre kaj tre dankas, via sendaĵo feliĉigas min

El aliaj leteroj:

Akceptu, estimata redaktoro, mian plej koran dankon pro la plenumo de mia peto. La pakajeto kun la gazetoj alvenis lomi difektite, sed tamen la ĝojo estas senlima. Rusaj Esperantistoj malsatas je Esperanto gazetoj kaj ĉiuj Esperantistoj . . .

. . . N-ojn 44-46 de via gazeto mi ius ricevis. Sincera ĝojo nia estu plej preferata danko via. Ĉu vi povas imagi nian miregon pri grandioza kongreso de Praha? Via priskribo estas tiel vivplena, ke ni kvazaŭ ĉeestis la grandan mond-feston de la Esperantistaro. Nia afero ne pereos, ĝi venkos baldaŭ. Brilas jam unuaj radioj de bela mateno. Espereble rusoj povos partopreni kongreson en Helsinko

. . . Alvenis ET, kvankam malnova sed interese. Ĉu mi povas aboni ĝin? Sed nia mono neniom ĉe vi valoras. Mi sendos al vi rusajn Esperantistojn modestajn kaj raportos al vi pri movado en nia urbo . . .

Nepriakribela estas mia ĝojo. Mi abonas ET. Ĝi alvenas sufiĉe regule, kvankam kelkaj numeroj perdis kaj aliaj difektigis. Bonvolu ne ĉesigi la sendadon! Kiam mi povos, mi pagos vin tuj. Varmegan dankon pro via komplezemo.

Tie, kie regas malfeliĉo . . .

Vintro . . . Terura frostoj . . . Malluma vespero . . . Mi rapidas en la bibliotekon, en nian komunan ripozejon . . .

(Multaj el vi, malnovaj Esperantistoj, sendube scias pri la Esperanta biblioteko en Saratov sur Volgo. Ĝis la revolucio ĝi estis kolektajo de la fama Esperantisto Georgo Davidov. La tuta ĝismilita Esp. literaturo troviĝas tie.)

Mi eniras. En la du ĉambroj de la biblioteko regas malvarmo. Mankas lignaĵo en la urbo. „Bonan tagon, bonan tagon!“ aŭdiĝas el ĉiuj anguloj de la biblioteko. Mi ĉirkaŭrigardas. Frostiĝintaj samideanoj afable salutas min.

Nun kvazaŭ en sonĝo mi vidas flavan, barbokovritan vizaĝon de la prezidanto de nia societo, s-o T., kiu de kelkaj monatoj ekĉevalis pro malsato kaj enmalsanulejiĝis. Jen preskaŭ sensanga vizaĝo de nia bibliotekisto studento s-o Z., kiu ankaŭ malsatas, sed tute fordonis sin por Esperanto. Li estas nia plej bona Esperantisto kaj stilisto. Jen fraŭlino A., tute juna, beleta Esperantistino, bona instruistino; sed ankaŭ ŝi de kelkaj monatoj pro malsato kovriĝis per ulceroj.

Senfine trapasas antaŭ mi elturmentiaj, elsuferintaj rusaj Esperantistoj. Ĉiuj ili laboras por la sankta afero.

Ili renkontas min kun soleneco.

„Kio okazis?“ mi demandas.

Senparole oni donas al mi ius ricevitan ĵurnalon „La Esperantisto“ Mi rigardas la daton . . . de julio 1920. Hodiaŭ estas februaro 1921. Sed mi tion ne atentis: mi ĝojas, legante ĵurnalon el Eŭropo

Mi ne volas priskribi detalojn el la vivo de Saratov'aj Esperantistoj; ne estas eble rakonti ĉion, kion eltoleradis la Esperantistoj en Ruslando — ili suferadis je malsato, ili suferadis pro Esperanto, ili suferadis pro amo al la tuta homaro.

T. M.

Torento.

De monto alta, en fal' senhalta, torento kuras.
perlane fluas, liberon ĝuas,
karesmurmuras.
Tra tuta mondo ŝaumadas ondo,
freŝecon spiras,
forlavos ŝlimon kaj la animon
al Puro floras.
La suno ludas en akv' kristala
per helradi'
Nuancas akvo en stri' vuala
kaj flustras ĝi
Venu al mi, ĉiuj junaj
kun varma, kun freŝa la kor' !
Ekfluos ni fortaj kaj kunaj,
la sunon kantante en ĥor'

Suno bela, suno varma,
lumradia
sur la bela, sur la ĉarma
firmament' !
Al Vi iras nun sincera
kanto nia,
Vin aspiras jen libera
la torent' .
Diamanta, en purpuro,
varmodona,

sun' brilanta en lazuro,
en altec',
ni Vin gloras, ho Potenco
orekrona,
Vin adoras, ho Esenco
de Belec' !

Verdaj ondoj trabatas graniton,
ĉion voje forportas kun si,
al malnovo deklaras militon,
belkantante pri la harmoni';
Verdaj ondoj kunportas fervoron,
flamigante per nova rimed',
donas povon, instigas laboron,
pligrandigas fortecon de l' kred'
Ŝprucas akveroj de l' Helo,
ŝprucas tra la universo;
brilas perleroj de l' Belo,
ŝutas kolorojn en verso.
Kantas la ondoj pri Vero,
diras pri fin' de turmento
Vokas al plena libero
Verda Libera Torento.

El „Unua Ondo“, Saratov 1918.

Senpagan Abonon

po nun ekzemplero ĉiusemajne ni promesas — provizore por la monatoj januaro, februaro kaj marto — al ĉiuj Esperantistaj propagandaj organizaĵoj en Ruslando kaj Siberio por ilia biblioteko.

Por la malsatantoj

en Ruslando ni ricevis pluan donacon: 5 norvegajn kronojn de s-ano H. Bonnevie en Kristiania.

La Tutruslanda Esperantista Unuiĝo de Helpo al Malsatantoj direktis al la redakcio de ET sekvantan leteron datitan de 30. okt. 1921:

La fondiĝo laŭ la iniciato de Petrogradaj Esperantistoj sub gvido de l' prezidanto de l' Petrograda Societo „Espero“ (s-ano Devjatnin), Esperanta Oficejo por Helpo al la Malsatantoj (adreso: Italskaja 31, Petrograd) koncencis sian agadon per alvoko en „Esperanto Triumfonta“, kies rezulto estis revoko de Londona Esperantista Klubo. Ni jam ricevis de tiu klubo monon en sumo de unu sterlinga pundo, kaj estas ricevontaj mangajojn (faruno, densigita lakto) en sumo de 8 sterlingaj pundoj.

Tiamaniera revoko de niaj anglaj samideanoj ne nur vekas en ni respondan varman simpatian al ili, sed ankaŭ konscion pri ĉiama nia danko al ili por akcelado al niaj ambaŭ celoj: bonfarado (helpo al la sennombraj malsatantoj, kiuj ĉiokaze estas ekster ajna politiko) kaj — paralele — propagando de Esperanto.

Ni ne fermu la okulojn kontraŭ la popola mizero, kaj ni laboru kaj helpu al la mizeruloj, kiom ni povos, por ke la mondo ne diru, ke la Esperantistaro nur amuzas sin per pure lingvaj demandoj, tute ne atentante malfeliĉojn de l' homaro

La Oficejo por Helpo al la Malsatantoj estas certa, ke ĝi trovos revokon simpatian ankaŭ inter ceteraj Esp. organizaĵoj eksterlandaj.

Por la Oficejo:

Timoteo Ščavinski (Markiz' de To-ŝo.)

Letero el Rumanio.

Cluj, 26. dec. 1921.

La agado de la Esperantistoj en Rumanio vekas ĉiam pli vastan interesigon por nia afero. En la pasinta monato s-o O. Goga, eminenta rumana poeto kaj eksministro, kore akceptis la Esperantistan delegitaron. La ministro diris, ke, kvankam li ĝis nun ne estis bona konanto de nia movado, tamen li ĉiam havis grandan simpaton por ni kaj por ke li povu pli bone sin orienti pri la Esperanta afero kaj studadi ĝin, li mendis malgrandan Esperanto-bibliotekon por 1000 leoj. La afabla akcepto kaj la apogo de la modern-spirita ministro faris tre bonan impreson ankaŭ en la rondo de kontraŭuloj de l' mondlingvo.

En la transilvana gazetaro konstante aperadas poresperantaj artikoloj. En la tre serioza ekonomia gazeto Kőzgazdasag d-ro Székely skribis grandan artikolon kun la titolo „Oni devas enkonduki Esperanton en la ekonomian vivon“. Ankaŭ de s-o Walter aperis en Kőzgazdasag dukolona artikolo pri la „Graveco de Esperanto en la nuna tempo“. En Baia-Mare aperanta Nagybanjal Hirlap, en kiu gazeto ĝis nun s-o Krišan aperigis grandan poresperantan artikolon, je la nomfesto de nia Majstro (15. 12. 21) la redakcio komencis Esperantan kurson per la gazeto. En urbo Deva komenciĝis nova Esp. kurso. En la 50-a numero (10. 12. 21) de l' gazeto Hunyadvarmegye s-o d-ro Leitner skribis ĉefartikolon pri Esperanto. Krome la ĵurnalo Deva és Vidéke (24. 12. 21) enhavas spritan artikolon, en kiu s-o Jokozze bonhumore klarigas la sencon de l' sufiksoj, skribante interalie, ke „ejo“ signifas la lokon de la faro, tial „konfuzejo“ signifas la ejon, kie la konfuzo ekestiĝas, do „kapon“; „ist“ estas la sufikso de l' faristo: do „konfuzisto“=„homo“; „ar“ esprimas multon, do „konfuzistaro“ egalas kunvenon de multaj homoj, t. e. „parlamento“.

En la kristnaska numero de l' Cluj'a 5-Oraj Ujsag (Kvinhora Gazeto) s-o Ha skribis varman, ĉarman artikolon pri la intima klubvivo de la loka Esp. grupo. Keleti Ujsag (Orienta Gazeto) de 21. 12. 21 fiere skribis, ke ĝia nomo estas menciita en la grava, moderna eksterlanda „Esperanto Triumfonta“. Nia kara ET, komenconte de Novjaro, estos vendata en Cluj ankaŭ sur la strato ĉe la gazetvendistoj.

La 15. dec. la Cluj'a verdstelanaro aranĝis bone sukcesintan Zamenhof-vesperon en la Komercia Akademio. Vespere estis bankedo en la Centra Hotelo. La feston kaj vespermanĝon ĉeestis la tuta loka rumana kaj hungara elegantularo, ankaŭ s-o d-ro Renet, la ataseo de la ĉeĥoslovaka respubliko. Oni multe tostis por la internacia frateco.

Dank' al la ĉefsekretario de la loka komerca ĉambro, s-o Balazs, ni ricevis klubojn en la ĉambro, kie oni kunvenadas ĉi-vespere de la 6-a ĝis la 10-a.

En januaro ni organizos la landan societeton kun ĉefurba centro. Ankaŭ estos eldonata rumana-Esperanta-lerolibro.

La verda stelo ĉiam pli forte brilas sur la ĉielo de nia lando, lumigante per siaj radioj la vojon, kiu kondukas nin en la nova jaro al la blanka altaro de l' internacia paco kaj amo.

Riu.

Blinduloj.

Esperanto inter blinduloj en Germanio.


La germana unuigo de blindul-instruistoj praktikis en sia ĉefkunsido de 6-a ĝis 8-a de oktobro en Halle la enkondukon de Esperanto en la blindul-institutoj kaj, laŭ propono de direktoro

Mortis Vladimir Korolenko.

La 25-an de decembro 1911 mortis en Poltava (Ukrainujo) la mond fama rusa verkisto Vladimir Korolenko. Al la legataro de ET Korolenko estas speciale konata per sia rakonto „La Senlingvulo“.

Vladimir Korolenko naskiĝis en la jaro 1853. Li lernis unue en la gimnazio de Jitomir, poste en Rovno. Post studado en superaj lernejoj en Peterburgo kaj Moskvo li estis arestata de la rusa registaro kaj ekzilita Siberion. Reveninte el la ekzilo, li komencis labori literature. Lia unua rakonto „Skizoj el la vivo de serĉanto“ aperis 1879. Famon li akiris per sia bonega rakonto el la siberia vivo „La sono de Makar“, aperinta en la jaro 1885. Poste li publikigis tutan serion de rakontoj el la vivo de Siberio. Veturinte en 1894 Amerikon, Korolenko post sia reveno skribis „La Senlingvulo'n“. En 1900 li fariĝis redaktoro de la grava rusa monata gazeto „Rusa Riĉeco“. En la sama jaro li estis elektata ano de Ruslanda Akademio de Sciencoj. En la jaro 1901 li veturis Ural'an regionon kaj priskribis tre interese la vivon de tieaj kozakoj.

Sed ne nur literaturisto li estis: Korolenko estis ankaŭ fervora publicisto kun larĝa kaj libera vividearo kaj krom tio aktiva socia laboranto. Per vortoj kaj per agoj li helpis al la malfeliĉaj aŭ persekutataj homoj. Tiel dum la granda malsato en apudvolga regiono je la fino de l' deknaŭa jarcento li ne nur publikigis aron da artikoloj pri organizado de helpo al la malsatantoj, sed mem praktikis laboris ĉe tiu organizado. Li defendis la vilaĝanojn kontraŭ persekutoj kaj ankaŭ energie protestis kontraŭ la pogromoj de la hebreoj. Tute ĝuste li estas tial — post Tolstoj — rigardata kiel la plej granda genio de Rusujo, kiel „la konscienco de Rusujo“.



Wilh. Reiner el Nürnberg, unuanime decidis proponi al la germana kultministerio, ke en la ekzamen-regularon por blindul-instruistoj Esperanto estu akceptata kiel egalrajta fremdlingvo apud la franca kaj angla. — Depost Novjaro 1922 Esperanto estas enkondukita kiel laŭvola fako en la progresiga lernejo de la blindul-instituto Nürnberg, kie dir. Reiner mem instruas laŭ la porblindula lernolibro de Borel. Blindaj samideanoj trovos gasteman akcepton en Nürnberg.

La blindula grupo en Frankfurt a. M. bone prosperas per energia helpo de s-o Urban, blindula instruisto. Sub liaj aŭspicioj ĵus aperis la germana-Esperanta vortaro du-voluma por blinduloj en Braille'a punkto-skribo. Speciala suplemento pri blindul-skribaj mallongigoj verkita de li aperos dum januaro. Tre laŭdinda laboro!

La financa rezultato de la XII-a

montras ĝojigan profiton de ĉ. 100 000 kĉ. Tiu ĉi sumo estas dividota inter: K. K. kaj Centra Oficejo en Paris po unu triono, alian trionon ricevos la kluboj de Praha. El la lasta triono ricevos la Esp. Klubo duonon, Rondeto de Esperantistinoj trionon kaj germana klubo „Verda Stelo“ sesonon. (Laŭ „Ĉsl. Gazeto“.)

Por „Esperanta Ligilo“

ni ricevis jenajn pluajn donacojn:

130. H. A. Scharwächter, Hago 125 mk. — 131. Diego Salguero, Bahía Blanca 50 mk. — 132. Vincente Orlando, Bahía Blanca 50 mk. — 133. K. H. Wernicke, Stendal 10 mk. — 134. Max Amort, Danzig 20 mk. — 135. A. Wilbert, Köln Deut 15 mk. — 136. W. Lippmann, Dresden 10 mk. — 137. Jules Thiébault, Carignan 25 fr. — 138. Fr. Michalek, Reichenberg 1/2 fr. — 139. H. Bonnevie, Kristiania 10 norv. kr. — 140. F. Hebing, Köln 50 mk. — 141. E. E. Yelland, London 2 šil. — 142. Emanuel Kull, Korsnäs, Svedl. 10 mk. — 143. Konrado Domenech, Girona 70 mk. — 144. Juan Anguita, Jaen 125 mk. — 145. Jan Kronenberg, Lomza 200 pmk. — 146. J. Ravestein jr., Hago 72 mk. — 147. Joh. Kratochvilla, Sered 50 kĉ. — 148. Edwin N. Wahl, Drammen 2 1/2 norv. kr. — 149. Pietro Bertogna, Trieste 10 lir.

Junularo.

En sia nuna stato la Esp. movado inter la junularo prezentas al ni ĝojigan aspekton. La ĝejnuloj en Bulgario kaj Germanio vige laboras

El la verkoj de Korolenko estas tradukitaj Esperanten krom „La Senlingvulo“ ankoraŭ: „Akceptita infano“, „Fajretoj“, „Fantomoj“, „Lasta radio“, „Maljuna sonorigisto“, „Momento“ kaj „Paska nokto.“

La morto de Vladimir Korolenko estas granda perdo tiel por la rusa kiel por la tutmonda literaturo.

J. Shapiro.

Unua Nordrusa Konferenco Esperantista.

La 15. nov. 1921 okazis en Petrograd la Unua Nordrusa Konferenco Esperantista. Oni komencis je 10.30 h vesp., en ejo de societo „Espero“, ĉe samovaro trinkante teon por varmigi, ĉar la temperaturo en la ĉambro estis — 1° C.

Tagordo estis jena: 1. Organiza demando, 2. Principoj por organizo de l' Norda Federacio, 3. Raporto pri agado de l' Eldona Kooperativo S.E.U., 4. Raporto pri Sovjetlanda Esperantista Servo, 5. Diversaj demandoj.

Partoprenis reprezentantoj el la dek gubernioj de l' Norda regiono: Arhangelska, Vologda, Vjalka, Novgoroda, Oloneca, Pskova, Petrograda, Ĉerepoveca, Tvera kaj Karelia. Sume 27 delegitoj (8 virinoj, 19 viroj) reprezentantaj 18 diversajn organizaĵojn.

Laŭ nacieco estis 16 rusoj, 3 estonoj, 3 sennaciuloj, 2 latvoj, 1 Esperantisto-internacisto, 1 polo kaj 1 hebreino. Laŭ particeco 4 komunistoj, 12 senpartianoj kaj 11 ne montris particecon. Laŭ profesio estis 5 instruistoj, 5 lernantoj, 4 librotenistoj, 2 kontoristoj, po unu studento, ĵurnalistoj, sovjeta oficisto, fervojisto, poŝtelegrafisto, artisto, metranpaĝo (?), ruĝarmeano, laboristo kaj 2 ne montris profesion.

Nova pruvo pri la neceseco de Esperanto.

Rusa monbileto de 5000 rubloj (malgrandigita).

Oni atentu la (eĉ erarhavan) tekston: „Proletarioj de ĉiuj landoj unuigu!“ en sep diversaj lingvoj — certe konvinka pruvo pri la neceseco de internacia lingvo por la internacia proletariato. Tre prave skribis ankaŭ s-o Devjatinin en sia t. n. „Esperanta Marseliezo“ „Internacionale sen Esperanto estos korpo sen kor!“

por Esperanto. Nun ankaŭ en Ĉeĥoslovakio nia movado inter la ĝejnularo kreskas. Ekzistas du organizaĵoj: Ĉeĥoslovaka Federacio de Junaj Esperantistoj, kaj Studenta Sekcio ĉe Ĉsl. Asocio Esperantista. Nun oni traktas la unuigon. La Federacio eldonas sian organeton. Junaj kamaradoj, skribu al la redakcio de nia folieto „Junularo“ (Privoz, Marxova ul. ĉ. 111, Ĉsl.) pri via agado! Se vi deziras informojn pri la movado, skribu al sekr. Boh. Matejka, Privoz, Ĉsl.

Fervolo.

Esperanto inter japanaj fervojistoj.

La 17. sept. Japana Fervojista Esp. Unuigo aranĝis propagandan kunvenon en klasalono de Fervojista Instituto ĉe Fervoja Ministerio. Ĉeestis pli ol 200 fervojaj oficistoj, el kiuj sin tuj enskribis 180 por kurso.

Laboristaro.

Germano Laborista Esp. Asocio.

La Asocio havas novajn grupojn en Mörfeld (Hessen), Garmisch, Heidenau apud Dresden, Sebnitz, Weiden-Löwenich, Werdau, Röhlingshausen (Vestf.), Jüterbog, Mutschau apud Zeltz, Eisleben kaj Oelsnit. Kursoj okazas en Braunschweig (30 partoprenantoj), Görlitz (pli ol 50 p.), Halle a. S. (30 p.), Wurzen kaj Taucha apud Leipzig, Riesa (27 p.), Gröbba (24 p.), Wiesdorf (25 p.), Hettstedt, Hohenstein-Ernstthal (90 p.).

Studentaro.

356 japanaj studentoj partoprenis Esp. kurson.

En Nagoja (Jap.), en la VIII-a Nacia Kolegio s-o S. Išiguro paroladis pri Esperanto antaŭ 500 studentoj. Tuj komenciĝis vere grandioza kurso kun 356 studentoj, kiu finiĝis la 29. sept. Nun fondiĝis Nagoja Esp. Asocio kaj Studenta Societo en la nomita Kolegio.

Virinaro.

Virina Internacia Federacio.

Fondiĝis en la ĉefurbo de la brazila ŝtato S. Paulo la „Virina Internacia Federacio“, kies celo estas la intelekta kaj morala edukado de la virino por ŝia emancipo. Ĝi fondos grupojn en la aliaj ŝtatoj kaj decidis uzi Esperanton por la eksterlanda korespondado. Direktas la movadon f-ino Lacerda de Moura, kies adreso estas: Rica da Consolacao 63, S. Paulo.

Tri Signoj.

(Himno dediĉita al la societo „Espero“ en Petrograd.)

Dum nokto malluma potenca alvok'
Bruadas tra vasto de l' tero
Kaj flugas en mondo de loko al lok',
Portate de milda etero.
Espero, obstino kaj la pacienc' —
Jen estas tri signoj de nia potenc'!

Obstin', pacienco, persisto, fervor'
Ekvekas homaron el dormo,
Instigos la mondon al nova labor',
Al kreo de nova vivformo.
Espero, obstino kaj la pacienc' —
Jen estas tri signoj de nia potenc'!

Espero, obstino kaj la pacienc' —
Devizo de nia anaro;
Tri vortoj, pro kies interna potenc'
Pereos la nokto miljara.

Espero, obstino kaj la pacienc' —
Jen estas tri signoj de nia potenc'.

La tago alvenas post nokta mallum'
Kaj pasos tra vasto de l' tero;
Pereos la ŝimo, foriĝos la fum',
Revenos en koron espero.

Espero, obstino kaj la pacienc' —
Jen estas tri signoj de nia potenc'!

Gefratoj, antaŭen al fina batal'
Por bono, por belo kaj vero!
La venkon decidis por ni la fatal' —
Triumfos simbol' de Espero!

Espero, obstino kaj la pacienc' —
Jen estas tri signoj de nia potenc'!

E. Drezén.

Kongresoj.

Internacia Antaŭkongreso 1922 en Lübeck.

Laŭ sciigo ricevita el Lübeck (Germ.) oni intencas tie aranĝi antaŭkongreson de 31. julio ĝis 3. aŭgusto 1922. Ankaŭ la Danzig'anoj intencas okazigi antaŭ- aŭ postkongreson en sia urbo. Espereble oni ne aranĝos tro da antaŭ- kaj postkongresoj, kaj ne tro grandiozajn, por ke la kongreso de Helsinki ne estu paligata per ili.

Sudgermana Esp. Kongreso.

Aŭstrio estis en la lastaj jaroj malprogresema rilate Esperanton. La kaŭzo estis, ke en Aŭstrio ne ekzistis forta, celega ligo por propagando kaj interrilatado de la koncernaĵo grupoj. Nun la Esp. Grupo de Salzburg aranĝos la 25-an kaj 26-an de marto 1922 „Sudgermanan Esp. Kongreson“, kies tasko ĉefe estos pritrakti la plivigligon de la propagando tiel en Aŭstrio kiel ankaŭ en Suda Germanio. Tiu ĉi kongreso fariĝos elmarŝpunkto por nova forta Esperantigo de grandaj landpartoj. Nepre necese estas, ke ĉiu samideano en Aŭstrio aŭ Suda Germanio venu al Salzburg por kunhelpi ĉe la konstruado de propaganda unuigo. Oni postulu jam nun aliĝilojn al la kongreso (kotizo por sudgermanoj 10 mk., por aŭstroj 100 kron.) Adreso: Ferd. Huber, Salzburg, Mönchsberg 5.

Katolikoj.

Kongreso de katolikaj pacifistoj.

Kompletege ni aldonas al nia tiurilata raportoj en n-o 63 de 18. dec.:

Okaze de la I-a Kongreso Demokrata en Paris (4.-11. dec.) kie estis reprezentataj 22 ŝtatoj, la problemo de internacia helpingo estis detale pritraktata, precipe per paroladoj de d-ro Metzger, Graz, kaj f-ino Meyer, Paris. Fine unuvoĉe la jena tagordo de d-ro M. estis akceptata:

„Konsiderante, ke la diverseco de la lingvoj prezentas gravan malhelpon al la ebligado ne nur de la teknika, sed ankaŭ de la interna reciproka interkompreniĝo de la diversnaciajanoj,

konsiderante, ke la lerno de internacia helpingo prezentas gravan helpilon de la edukado al internacia spirito demokrata,

konsiderante, ke per internacia neŭtrala lingvo estos eble subigi multajn konfliktojn en laŭlingve miksitaj ŝtatoj,

konsiderante, ke per la disvastigado de facile lernebla lingvo precipe ankaŭ al la laborista klaso estos ebligite, partopreni je la internacia vivo, je internaciaj kongresoj, je la reprezentado senpera al la Ligo de Nacioj. —

la I-a Internacia Kongreso Demokrata rekomendas la disvastigon de Esperanto en ĉiuj landoj kaj deziras precipe la enkondukon de la instruado de Esperanto kiel unua fremda lingvo krom la gepatra lingvo en la tutmondaj lernejoj.“

Denove

la ĉefredaktoro de ET devas peti paciencon de siaj gekorespondantoj. Pro dusemajna malbonfarto li ne povis en lasta tempo labori tiom kaj tiel, kiom kaj kiel li deziris. Krome grandmezura propagando por ET en diversaj landoj, speciala ekspedado de preskaŭ mil ekzempleroj de n-o 66 al sciencistoj, de la hodiaŭa numero al rusaj Esperantistoj, kaj la jarŝanĝo per si mem kaŭzis obligitan laboron, tiel ke estis fakte neeble ĉion tuj kaj akurate plenumi. Do, bonvolu pacienciĝi iomete. Baldaŭ ĉio ree funkciados bone.

Malvivaj objektoj.

Se malvivaj objektoj povus vivi, se tero kaj akvo povus diferencigi inter amikoj kaj malamikoj: mi ŝatus posedi ilian amon. Mi volus, ke la verda tero ne sentu miajn pezajn paŝojn kiel premon. Mi volus, ke malpezkoro ĝi pardonu al mi tial, ĉar pro mi ĝi estas vundata per plugilo kaj erpilo, tial, ĉar ĝi sin malfermas senproteste por mia malviva korpo. Mi volus, ke la ondo, kies brila spegulo rompas miajn remilojn, havu por mi la saman paciencon, kian patrino havas por malkvieta infano, grimpana sur ŝiajn genuojn, — ne atentante, ke ĝi ĉifas ŝian robon silkan, destinitan por festotagoj. Mi volus amike interrilati kun la klara aĉero, kiu vibras super la bluaj montoj, kaj kun la radiantanta suno kaj kun la belaj steloj. Ĉar ofte ŝajnas al mi, kvazaŭ la malvivaj objektoj sentas kaj suferas kun la vivaj. La diferenco inter ili kaj ni ne estas tiel granda kiel la homoj imagas. Ĉu ekzistas eĉ parteto el la tera polvo, kiu ne partoprenis en la rondiro de l' vivo? Ĉu la kirliĝanta polvo de la ŝoseo ne estas iam karesita kiel molaj haroj, amita kiel bonaj helpemaj manoj? Ĉu la akvo en la radaj postsignoj ne iam fluas kiel sango tra batantaj korjoj?

La spirito de l' vivo loĝas ankoraŭ en la malvivaj objektoj. Kion ĝi aŭdas dormetante en sensonga stato? La voĉon de Dio ĝi aŭdas — ĉu ĝi aŭskultas ankaŭ tiun de la homoj?

Vj idoj de pli postaj tempoj, ĉu vi ne vidis tion ĉi? Kiam malpaco kaj malamo regas sur tero, ankaŭ la malvivaj objektoj diversmaniere suferas: La ondo fariĝas furioza kaj rabema kiel apudvoja krimulo; la kampo fariĝas retenema kiel avarulo. Sed ve al tiu, pro kiu la arbaro ĝemas kaj la montoj ploras

SELMA LAGERLÖF
en „Gösta Berling“.
Trad.: ZANONI.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Britlando.

En Uxbridge fondiĝis nova Esp. grupo. Konferenco de „Midland Federation“ okazos la 21. jan. en Leicester, Cooperative Buildings. La „South-Western Federation“ kunvenis en Bristol la 14. jan.

La „Lancashire and Cheshire Federation“ havos konferencon la 28. jan. en Town Hall, St. Helens.

Franclando.

La komerca ĉambro de Beauvais donacis la 29. dec. laŭ unuvoĉa decido al la Esp. grupo 50 fr. kaj konsentis kursejon. Kurso de s-o Demarcy en la unuagrada supera lernejo partoprenas 25 lernantoj.

Svislando.

La 6. dec. senatano Lafontaine, delegito de Belgio en la Ligo de Nacioj, en Genève paroladon pri Esperanto en la Ateneo sub la protekto de la Komitato Ernest Naville kaj sub la prezido de s-o Paul Morriand, dekanato de la jura fakultato de la Universitato.

El Svislando (Tiĉina kantono).

Nia senlaca s-ano Carlo Gilà, industriisto kaj delegito de UEA en Locarno, estas elektita vicprezidanto de nia kantona komerca ĉambro.

En Biasca s-ino G. Alberti Mattei, instruistino en Osogna, gvidas kurson kun 30 personoj ĉe la laborista kultursocieto.

En Lugano okazis Esp. festo je memoro de Zamenhof. Kurso bone daŭras.

En Bellinzona la kurso ĉe la popoldomo bone daŭras. Grupo haldaŭ fondota.

La tiĉinaj Esperantistoj sendis al la kantona komerca ĉambro leteron subskribitan de la reprezentantoj de la Esp. movado kaj de 15 gravaj komercaj entreprenoj de Lugano.

Nederlando.

La 1. dec. okazis en Aalsmeer publika kunveno, dum kiu parolis Esperantlingve nia samideano L. Kelety, invitive de la Aalsmeera Esp. Soc. „Ĉiam supren“. S-o Kelety, kun sia edzino vojaĝante el Transsilvanio al Argentino, paroladis pri „Argentino, tra la mondo per Esperanto“. La parolado estis ilustrata per belegaj lumbildoj kaj per la neesperantista parto de la publiko tradukata en nederlandan lingvon. La neesperantistoj certe ricevis per la parolado fortan impreson pri la uzebleco de Esperanto.

Germanio.

En Frankfurt a. M. okazis jarkunveno de la grupo. La grupa vivo ne vigliĝas pro specialaj cirkonstancoj en Frankfurt. Du kursoj, unu por instruistoj, funkcias; nova komencos. Kunveno ĉiulunde je 8 h. en Moderne Sprachschule. Esperantistoj povas informiĝi sin ĉiutage de 9 h. mat. ĝis 10 h. vesp. Esperanto parolata. Pri malsukcesinta parolado de la Idisto s-o Peus ni raportos en la venonta n-o, se estos loko. La Esperanto-Kartelo entreprenas kontraŭagon al la malesperantemo de la komerca ĉambro. La foirpropagando bonege progresas. Laŭ sciigo de la foira komitato novaj Esp. presaj aperos en januaro.

Al la Printempa Kongreso de Rejnlanda Vestfalia Esp. Ligo (Revelo), kiu okazos la 29. kaj 30. aprilo en Hagen, aliĝis jam preskaŭ 200 partoprenantoj. Pluajn aliĝojn akceptas Revelo, Köln, Hohestr. 26.

La 12. dec. s-o ĉefredaktoro Hartenfels faris paroladon en la akumulatora fabrikejo de Hagen al la geoficistoj de ĉi tiu fabrikejo. Komenciĝis kurso kun 18 p. Gvidanto s-o Dickel.

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimír Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. Tradukis laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

(49-a daŭrigo.)

Nun tamen Mateo jam havis intencojn. Bone pripensinte sian situacion dum la longa nokto, kiam la urbo dormis kaj je ia distanco jen aperadis, jen malaperadis la ombroj de policano Kelly kaj de la detektivo, — li faris la konkludon, ke sian sorton oni ne povas eviti, kaj sian propran sorton li, la senpasporta senlingvulo, prezentis al si en formo de neevitebla malliberigo. Li ĉion bone pripensis kaj decidis, ke pli aŭ malpli frue li ne evitos konatecon kun la amerika malliberejo. Do ne indas prokrasti la aferon! Li per signoj montris, ke li nenion komprenas: ĉi tie certe neniu scias pri lia aventuro en Nov-Jorko. Kaj li eĉ ekspiris kontentigita kaj kun ĝojplena konfido levigis renkonte al la bonkora John Kelly, kiu sin direktis al li, dispuŝante la homamason. —

La juĝisto Dickinson, enirante matene en sian juĝejon, aŭdis bruaĉon kaj kriadon ekstere sub siaj fenestroj; tuj poste en lian ĉambron enpuliĝis amaso da homoj. La nekonaĝa grandegulo kviete staris en la mezo. John Kelly havis ĝojsolanan micnon.

„Li aperigis sian intencion, s-ro juĝisto,“ diris la policano, elpaŝante antaŭen.

„Bone, John Kelly! Mi scias, ke vi pravigos la konfidon de la urbanaro. Kiun intencion aperigis la viro?“

„Li volis mordi mian manon.“

„S-ro Dickinson rektigis en sia apogseĝo.“

„Mordi vian manon? Do tamen tio estas vero? Ĉu vi estas certa pri tio, John?“

„Mi havas atestantojn.“

La instruplano de la popolinstruaj kursoj en Halle a. S. montras ankaŭ Esp. kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Instruanto s-o Papenthin. La ĵurnalo „Hallische Nachrichten“ konsentis aperigi Esp. angulojn.

Esperanto Gruparo Berlin.

La 6. dec. okazis en la nuna klubejo Bellevue-straŝe 15 (hejmo de la sciencia asocio) la ĝenerala kunsido. Per ŝanĝo de la statutoj de nun nur la elektitaj delegitoj de la diversaj grupoj rajtas decidi en laborkunsidoj pri la propagandaj aferoj ktp. — En la laborkunsido de 30. dec. tiuj grupdelegitoj nun elektis la novan estraron: prez. direktoro Glück, vicprez. s-o Schwarz, sekr. s-o Wichert, vicsekr. f-ino Nickel, kas. s-o Schwarzschild. S-o patentadvokato Schiff pro siaj grandaj meritoj dum sia pli ol 15-jara prezidanteco estis elektata honora prezidanto.

Libera Urbo Danzig.

La 5. nov. okazis la XIV-a fondiĝifesto de Danzig'a Esp. Asocio; ĉeestis 300 personoj, inter ili kelkaj samideanoj el Polujo.

Nuntempe okazis kvin kursoj por komencantoj kun entute ĉ. 100 partoprenantoj.

La 4. dec. oni festis la 80-an naskiĝotagon de la fondinto kaj honora membro de la Asocio s-ino Anna Tuschinski. Ĉeestis 250 personoj. Gratulegramoj kaj leteroj alvenis el la tuta mondo en ĉia amaso, ke ne estis eble laŭlegi ĉiujn. Malgraŭ ĉia eksterordinara freŝeco la vigla jubileulino ne povis mem hejmen porti la multegon da flordonacoj, el kiuj sveda vazo de s-ano Einar Adamson, kiu kun edzino kaj konatoj vizitis la asocion, certe estis la plej bela. La gazetoj mencias la entuziasmon de la jubileulino por la nobla ideo de Esperanto.

La 6. dec. estas fondita junulara grupo, kies prezidanto estas s-o Wilh. Machalinski, Danzig, Dominikswall 2; ĝi jam nombras 30 pagintajn membrojn. (Laŭ raporto de s-o Max Amort.)

Finnlando.

La decembra numero de „Esperanta Finnlando“ raportas pri kursoj en Voltii (12 p.), Laihia (2 kursoj), Härmä, Kurikka, Konnisa (2 kursoj), Kuopio (2 kursoj en lernejoj al knabinoj). Paroladoj pri Esperanto okazis en Tyrvää, Pori kaj Karkku. Dum novembro 30 finlandaj gazetoj aperigis 50 artikolojn pri Esperanto.

Ĉeĥoslovakio.

La 11. dec. okazis en Chrudim la 8-a laborkunsido de orientbohemiaj Esperantistoj kun 37 partoprenantoj. La 8-a kunsido okazos la 5. marto en Ceska Trebova.

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista nun havas 16 klubojn, 107 izolulojn; entute 768 pagintajn membrojn.

En Meierhöfen apud Karlsbad okazis la 10. dec. bone sukcesinta familia vespero kun bela programo kaj balo okaze de la fondiĝifesto de la Esp. societo.

Bulgario.

En Ruse (Rusĉuk) estas malfermita kurso por 45 plenaĝuloj, gvidantoj Vl. Georgiev. En la gimnazio oficiale instruas Esperanton lektoro Hristo Kjunĝurov. La urba biblioteko abonis ET. Entute Rusĉuk ricevas ĉiusemajne ĉ. 20 ekz. de ET.

En Jonava (Litovio)

La Esp. societo „Verda Espero“ aranĝis la 17. dec. prezentadon de viva bildo kaj teatraĵoj, deklamojn kaj dancadon. La festo rezultigis profiton de 2141 mk., el kiuj oni destintis 1070 mk. por malriĉaj lernantoj en Jonava, 100 mk. por monumento al D-ro Zamenhof, 100 mk. por „Esp. Ligilo“, 200 mk. por malriĉa virino kaj 671 mk. por aĉeto de libroj por la biblioteko.

„Bone! Ni demandu la atestantojn. La afero postulas atentan esploradon. Ĉu s-ro Nilov ankoraŭ ne alvenis?“

S-ro Nilov ne estis ankoraŭ tie. Mateo observadis ĉion okazantan kun miro kaj malkontento. Li estis preta submetiĝi al la neevitebla; sed nun ŝajnis al li, ke eĉ tia bagatelo ne estas farata en Ameriko laŭregule. La afero prezentigis al li multe pli simpla. Oni postulas pasporton, pasporton li ne havas. Oni lin arestas, kaj policano kun librego sub la brako kondukas lin en koncernan oficejon. Poste ĉio okazos tiel, kiel la estraro decidis. Sed ĉi tie eĉ tian simplan aferon oni ne scipovas fari dece. Amasiĝis homoj — neniu scias, pro kio, kvazaŭ por okulaĉi beston — ĉiuj enpuliĝas la juĝejon, kie la ĉefan lokon okupas la hieraŭa ĉifonvestito, verdire hodiaŭ vestita tute konvene, kvankam sen iaĵ signoj de ofica rango. Mateo ĉirkaŭrigardis kun indigno.

Dume juĝisto Dickinson komencis la juĝan esploron.

„Antaŭ ĉio ni konstatu la naciecon kaj la nomon“, li diris. „Via nomo?“

Mateo silentis.

„Via nacieco?“

Sed ricevante zenijn respondojn, la juĝisto ekrigardis la ĉeestantojn.

„Ĉu ne troviĝas inter vi iu, sciante almenaŭ kelkajn rusejn vortojn? Sinjorino Brays? Laŭdire, via patro naskiĝis en Rusujo?“

El la homamaso eliris virino proksimume kvardekjara, malaltkreska, kun bluaĵ kiel ĉe Mateo sed iom malklaraj okuloj. Ŝi starigis antaŭ Mateo kaj komencis ion rememori.

En la juĝejo regis silento. La virino rigardadis la Loziŝanon, Mateo ne deturnadis siajn okulojn de ŝiaj senbrilaj okuloj, en kiuj nun vidiĝis iaj malklaraj rememoroj. Ŝi estis filino de pola elmigrinto. Ŝia patrino de longe mortis, la patro mortis pro alkoholisimo en Kalifornio,

Maroka lando.

Soldato en la fremdula legio Jegoff, ĝis nun en Beni Mellal, nun estas en Marrakech, kie li intencas daŭrigi sian propagandon por Esperanto inter legianoj. Lia adreso: Jegoff, 1809, 4. Regt. Etranger, 1. Bat., 3. Comp., Marrakech.

(Laŭ raporto de s-ano Chaim Fain.)

Usono.

S-o J. D. Sayers faris paroladon antaŭ pli ol 50 radiotelegrafistoj en la „Long Island Radio Club of Greater New-York“. La parolado trovis grandan entuziasmon.


Esperanto en Japana lando.

Kursoj funkcias nun en Tokio ĉe Nippon Esperanto-Sya (2 klasoj), Komerca Universitato, Hosei Universitato, Tokia Dentkuraĉista Kolegio, Keio Universitato, Takaĉiho Komerca Kolegio, en la domo de s-ano Ktsaki (en okcidenta ĉirkaŭaĵo de Tokio), la redakcio de „Semanto“ Japana Esp. Instituto nun rapide kreskas, po du novaj membroj meznombre enskribiĝas ĉiutage.

En Niigata fondiĝis Esp. Instituto kaj komenciĝis kursoj.

En Jocosuka kaj Zuŝi leŭt. Aŭaja gvidas kursojn.

Vidu ankaŭ sub „Studentaro“!



Pioniro de Esperanto en Oriento.

S-o R. Vonago, notario, prezidanto de Esp. Societo en Vladivostok.

Nekrologo.

Mortis en Potenza, Italio, s-o Senofonte Lodi, estiminda patro de nia samideano f-ino Adelaide Lodi kaj vic-ekonomo de la Nacia Kolegio en Potenza, simpatianto al nia movado. Nian sinceran kondolencon al lia funebranta familio.

Panstenolalio.

Ŝpari tempon estas plilongigi la vivon. Por tio ni havas la stenografion, lingvon Internacian ktp. Restas ankoraŭ la „stenolalio“, t. e. mallonga lingvo. Kiel la stenografio ne estas malamiko de l' kutima skribo, sed ĝentila amiko de la lasta, tiel ankaŭ la stenolalio ne estas konkuranto al la kutima parolo: bus, cif, auto, USA ne

kaj ŝi estis edukita de amerikanoj. Iuj malproksimaj rememoroj ekmoviĝis nun en ŝia kapo. Ŝi de longe forgesis sian gepatran lingvon, sed en ŝia memoro restis fragmentoj de l' kanto, kiun iam ŝia patrino kantis por ŝi, malgranda infanino. Subite ŝiaj okuloj ekbrilis, kaj ŝi levis la manon super la kapo, klakigis la fingrojn, sin turnis kaj ekkantis en pola lingvo, strange, kvazaŭ fonografe:

Nia patrino . . . perdirko

Batas volonte infanojn . . .

Mateo ekremetis, sin jettis al ŝi kaj ekparolis rapide, ekscitite. La sonoj de la slava lingvo donis al li la esperon, ke li estas savota, ke fine oni lin komprenos, ke troviĝas ia rimedo . . .

Sed la okuloj de la virino jam estingiĝis. Ŝi memoris tiun frazon el la kanto, ne komprenante eĉ unu solan vorton. Ŝi klinis al li la juĝiston, diris ion angle kaj iris flanken.

Mateo sin jettis post ŝi, ion kriante, kvazaŭ freneza, sed iu germano kaj Kelly baris al li la vojon. Eble ili timis, ke li mordos la virinon tiel same, kiel li volis mordi la policanon.

Tiam Mateo kaptis la brakparton de l' seĝo kaj ŝanceliĝis. Liaj okuloj estis larĝe malfermitaj kiel ĉe homo, vidanta teruran fantomon. Efektive, li, malsata, elturmentita kaj konfuzita, la unuan fojon en sia vivo sonĝis nun en sendorma stato. Li prezentis al si tute klare, ke li troviĝas ankoraŭ sur la ŝipo, staras ĉe la ŝipa malantaŭaĵo, lia kapo turniĝas kaj li falas en la maron.

La saman sonĝon li sonĝis pli ol unu fojon dum la vojaĝo kaj, vekigante, li ĉiam pentris al si la suferojn de malfeliĉaj ŝippereantoj; restintaj solaj sen iaj esperoj, meze de sensenta, senfina, minaca oceano.

Nun tiu sama sonĝo sin portis antaŭ liajn larĝe malfermitajn okulojn. Anstataŭ juĝisto Dickinson, anstataŭ policano Kelly, anstataŭ ĉiuj tiuj homoj, anstataŭ la juĝeja ĉambro li vidis antaŭ si moviĝantajn ondojn, ŝaŭmantajn, larĝajn,

estas renkontataj en la poezio! Por unu Lingvo Internacia oni devus krei unu „panstenolalion“, t. e. kolekton de la internaciaj mallongvortoj kaj mallongigajoj jam ekzistantaj en la negoca vivo de Eŭropo kaj Ameriko.

Amikoj de l' mallongeco kaj lakonismo devas unuigi sin al ligo. Projektoj, konsiloj, proponoj, demandoj ktp. estas kun plezuro kaj danko akceptataj de Nik Juŝmanov, Ekateringofski 8, kv. 2, Petrograd, Ruslando.

Gazetaro.

Finnlando.

Dum novembro 1921 aperigis 30 finlandaj gazetoj 50 artikolojn pri Esperanto.

Allandaj gazetoj.

Droit du Peuple, Genève, 27. 12. („La vivo internacia. Al la memoro de Zamenhof“, de Edm. Privat.)

L'Avenir, Paris, 3. 1. („La franca lingvo kaj Esperanto“, bonega artikolo de s-o Chaumet, eksministro de poŝtoj.)

L'Exportateur Français, Paris, 2. 1. (2paĝa artikolo de s-o Baudet, membro de Paris'a komerca ĉambro.)

Sonntagsblatt, Staatszeitung und Herald, New York, 25. 12. (36paĝa ĵurnalo, enhavas artikolon de s-o Scheibler „Kiel germana lernantino helpe de Esperantistoj venis Hispanujon“.)

Teataja, Tallinn, Est., 15. 12. (Ampleksa Esp. angulo.)

Neue Lodzer Zeitung, Lodz, Pol., 1. 1. (Esp. angulo.)

Nova Sociedade, Rio de Janeiro, dec. (Esp. kurso.)

Keleli Ulsag, Cluj, Rumanio, 21. 12. (Recenzo pri ET, kaj artikolo.)

Recenzejo.

Libroj.

DE VÖLKERSPRACHE ESPERANTO. Vollständige. Lehrbuch nebst Uebungs- und Leseteil. Verktis prof. Josef Šušter, gvid. de la urba Esp. lernejo en Saaz, 72 pĝ. 15 x 25 cm. Havebla ĉe J. Kern, libroj, Saaz (Ĉeĥosl.). Prezo 9 Kč.

Ĉi tiu kompleta Esp. lernolibro estas la unua, kiu ricevis oficialan aprobon de Instrumministro (ordono de 26. julio 1921, Z. 67262). La libro havas la principon instigi kaj ebligti la lernanton, ke li povu tuj paroli. Tial mankas en ĝi la kutima sistemo sekvata de multaj instrulibroj. La aŭtoro priparolis laŭpove tion, kio akcelas la parolpoveblecon, kaj la enhavo de la 14 lecionoj, por kies studado sufiĉas duona jaro. ne lacigos la studentojn. Precipe la dekkvara leciono donas konvenan materialon por la ekzercado rilate vorfaradon kaj tradukadon de tipaj „Esperantismoj“. La legatoj estas tre interesaj laŭ formo kaj enhavo. Entute: bonega lernolibro, rekomendinda al ĉi instruanto ĉu por lernejoj ĉu por privataj kursoj. Tuj paroli! Jen la devizo de ĉi tiu instrulo. (G. Aĥul.)

Flugfolioj, glumarkoj ktp.

DEI FRANCAJ FLUGFOLIOJ: Pour l'expansion commerciale de la France à l'Étranger, kaj: Quelques uns des derniers succès de l'Espéranto, eldonitaj de Esp. Oficejo Lyon (s-ino Farges), 36 rue Victor-Hugo.

XI-a GERM. ESP. KONGRESO, Breslau 1922, eldonis glumarkon trikoloran. 45 x 65 mm. Blanka-ruĝa fundo karakterizas la kolorojn de Breslau; blazono maldekstre estas la urba insigno. Prezo por Germ. 100 ekz. 8 gmk. afr., por eksterlando 20 gmk. Havebla ĉe s-o Georg Habelok, Breslau 10, Schleiermacherstr. 19, poŝtekkonto Breslau 15987.

Gazetoj.

EGIPTA ESPERANTISTO, Dec. Jen nova Esp. gazeto, kiu eble ne estas necesa sed kiu povas fariĝi tre utila, se oni sukcesos ĝin daŭre kaj regule eldoni; ĉar Egipta lando estas multlingva, kaj la perspektivo por Esperanto tie estas bona. La redaktado de la gazeto en multaj lingvoj (Esperanta, franca, angla, itala, eventuale greka kaj araba) ja estas interese sed malfacila tasko; tamen ni esperas, ke iom post iom la redaktanto sukcesos venki la malfacilaĵojn kaj, antaŭ ĉio, publikigi nur bonstilan, seneraran, legindan Esp. tekston. — Adreso: s-o G. Wilken, Farahdeh str. 4, Aleksandrio. — Jarabono 5 avis. tk. aŭ 20 resp.-kup.

La Verda Ombro. Okt.

Eskiano. Sept.

Agitanto. 18. okt.

La Suda Kruco. Nov.

Literaturo. N-o 12.

Ni petas la administracion sendi interŝange minimume du ekzemplerojn de sia kvankam bona sed nur kvaronara gazeto.

malvarmajn, senfinajn, sennombrajn . . . ili moviĝas, ili bruegas, ili plaŭdiĝas, levigas, ili dronigas. Vane li penas elsubakvigti, krii, vokti, trovi apogpunkton, elnaĝi . . . lo ĉirkaŭ lin mal-supren. La oreloj zumas, antaŭ la okuloj sternaĝas verda profundegajo, mistera, terura. Tio estas pereoj! Sammomente kliniĝas al li homa vizaĝo kun bluaĵ rigidaj okuloj. Li vivigas, komencas esperi, li atendas helpon. Sed la okuloj estas senvivaj, la vizaĝo mortpala. Tio estas vizaĝo de malvivulo, droninta pli frue.

La tuta bildo preterglitis lian imagon dum momento sed tute klare; lia koro sin kuntiris pro teruro, li profunde ĝemis kaj ĉirkaŭkaptis sian kapon.

„Dio Sinjoro, Sankta Virgulino! helpu al mi malfeliĉulo! Ŝajne, mia kapo ne estas tute en ordo!“

Li froitis la okulojn per la pugno kaj ree komencis serĉi signon de ia espero sur ĉiuj vizaĝoj.

Dume policano John klarigis al la juĝisto, en kiuj cirkonstancoj montriĝis la intenco de la allandulo. Li rakontis, ke kiam li aliris la viron, tuj prenis lian manon jen kiel — John prenis la manon de la juĝisto poste kliniĝis jen kiel

Kaj policano John, por esti pli bone komprenata, sin klinis al la mano de la juĝisto, vidiĝis siajn blankajn dentojn kun esprimo de plej sovaĝa furiozejo.

Ĉi tiu demonstrativa prezentado faris fortan impreson sur la ĉeestantojn sed la plej fortan sur Mateon. Tia lingvo estis ankaŭ de li komprenata. Vidinte la geston de Kelly, li per unu fojo komprenis multon: li komprenis, kial hodiaŭ la policano tiel rapide fortiris sian manon, li eĉ komprenis, pro kio li, Mateo, en la Centra Parko ricevis bastonfrapon . . . Kaj tian ofendigaĵon li sentis, tian maldolcecon, ke li forgesis ĉion . . . (Daŭrigota.)

Nederlanda Esperanta

Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)
Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)



Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝarĝas per la dissendo de cirkuleroj.
Prokuras komercajn adresojn.
Prizorgas la anoncadon en Nederlando.
Interrilatas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.
Sciligas la kurzojn de valutoj kaj valorpapiroj.

Poŝtmarkoj ĉiulandaj

(transoceanaj, koloniaj, novaĵoj) kaj ĉiaj filatelistaj bezonaĵoj (albumoj, katalogoj, ktp.) estas liverataj je malalta prezoj laŭ katalogo Ivert Tellier de E. Gabelmann, komercisto, Freiburg i. Br. Katharinenstr. 14 (Germ.)

Abonejoj de ET en la landoj

- Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg.
- Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.
- Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
- Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralovce. Otto Lumpe, Trautenau.
- Estona: Est. Esp. Unuiĝo, postkasto 6, Tallinn.
- Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
- Franca: Esp. Centre Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
- Hispana: Konrado Doménech, Ĉerono, Rambla Alvarez 12-2.
- Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.
- Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.
- Litova: Paŭlo v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
- Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 5125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
- Rumana: Esperanto-Oficejo Ĉiuj.
- Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
- U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Per Esperanto

la estro de la fako komerca kaj industria ĉe la urba oficejo de Tokio deziras aranĝi

Ekspozicio de ĉiusecaj komerc-reklamaĵoj.

Konsiderante, ke tio povas havi bonan propagandan efektan por Esperanto en nia lando kaj ankaŭ en tutmonda komercaj rondoj, mi petas sendi al mia adreso (Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio) aŭ rekte al s-o S. Kaŭŝima, faktestro de komerc kaj industrio ĉe la urboficejo Tokio, ĉiusecajn pendreklamajojn, muraĵojn ktp. diverslandajn en iliaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Celo de la ekspozicio estas instigi la ĉi-landajn komercistojn al la plej progresinta moderna reklam-maniero. Al sendintoj la fako komerca kaj industria rekompence sendos japanajn komercajn pend-aĵojn.

M. Ga, Tokio (Jap.)
Del. de UEA.

Anoncetoj.

- GEFIANĈIĜO. F-ino Bözsike Simonovanszky kaj s-o Johano Kraichvilla, instruistoj, anoncas alian gefianĉiĝon. — Sereď (Slovakio).
- DANKO. Al ĉiuj bondezirintoj pro la Nova Jaro mi dankas kore kaj respondas samsece. Pro manko de tempo kaj pro multekosteco de afanko mi bedaŭrinde ne povas al ĉiu respondi individue. Do, koran dankon! Maria Juno, stud. rer. pol., Köln, Am Zuckerberg 8.
- ESP. EKSPozICIO. Por interesi geurbanojn, lomete ni konfidantajn al nia lingvo, ni aranĝas Esp. ekspozicion dum majo 1922. Redakcioj, grupoj kaj apartaj Esperantistoj estas afable petataj sendi diversajn gazetojn, propagandilojn, ilustr. poŝtkartojn ktp. al adreso: Vladi, mir Georgiev Chavgov, str. Skobeleva 88, Rusku-Bulgario.
- PROPONO. Matriĉa samideano (grupfondinto kaj grupestro) petas bonkorajn finajn samideanojn por senkosta gastigo dum la XIV-a kongreso. Rekompence ni gastigos finnon samlongan temon en Salzburg. — Oni sendu bonvolajn proponojn al Ferd. Peter Huber, Salzburg, Aŭstrio, Mönchsberg 5.
- POLAJ ESPERANTISTOJ! Legu „Świat Pracy“, organon de Asocio de Laboristaj Kooperativaj Societoj, kiu publikigas konstantan Esp. kronikon. Ricevbla ĉe Księgarnia Robotnicza, Warszawa, Waplna 17.
- ET n-ojn 8, 10, 11, 12, 13, 14, 17 kaj 21 deziras aĉeti s-o A. Ferrer, Asturias 44, l. Barcelona, Hisp.
- ET n-ojn 1-8 kaj 13 deziras aĉeti s-ano Antonio Juca, str. Santa Isabel 50, Fortaleza-Ceara, Brazilio.
- JUNULARO. La redakcio de la Esp. gazeto „Junularo“ deziras ricevi Esperantajn manuskriptojn (mallongajn rakontojn, artikolojn, poemojn). Rekompence oni sendos la gazeton dum unu jaro. Adreso: „Junularo“, Privoz, Ĉeĥoslovakio.
- „GVIDLIBRO DE GIRONA“. — Mendu ĝin ĉe la grupo „Gerona Espero“, Urbdomo (Cases Consistorials), Girona, Hisp. — Belegaj gravuraĵoj kaj detala arkeologia kaj historia priskribo de la urbo. — Prezo unu peseto aŭ alia egalvalora monsumo.
- SENFADENA TELEGRAFADO. Deziras poŝtkartojn aŭ fotografajojn de stacioj por senfadena telegrafado, amatorajn aŭ komercajn. John Ten Eyck Hinkel, 2520, Channing Way, Berkeley, Kalifornio, Usono.

Antaŭ nelonge aperis en la eldonejo de Wilhelm Violet, Verlagsbuchhandlung, Stuttgart:

Esperanto.

La Gramatiko de D-ro Zamenhof kun komentario de Prof. P. Christaller.
96 paĝoj. Prezo hindite gmk. 11.40.

Ne lernolibro por komencantoj, sed enciklopedio por ĉiuj dezirantaj perfekte elerni la lingvon. Samtempe bonega ekzerclibro pro la apuda Esperanta traduko. En tri monatoj 1500 ekzempleroj vendita!


 Registrita Fabriksigno
 N-o 242161
ERNST VANOLI
 FREIBURG i. Br., Germ., Starkenstr. 19.
 Fabrikado de novspecaj ludiloj.
 Eksperto ĉiulanden. — Kapablaj reprezentantoj dezirataj.

Korespondantoj, atentuj!

Ĉiu el vi havas, kiel mi scias laŭ propra sperto, la deziron posedi fotografajojn de sia korespondanto aŭ -ino. Sed la kulmaj fotoj estas hodiaŭ tro multekostaj por iu el ĉiuj. Mi povas al vi liveri por la interŝanĝo tre malmultkostajn

belajn vizitkartojn kun via fotografajo.
Prezo por 100 kartoj kun bildo kaj nomo 85 germ. mk. ĉiu plia linio da teksto kostas 2 mk. pli; por sendokosto aldonu koncernan sumeton. Formato 95 : 45 mm. Farata laŭ ĉiu ajn fotografajo, kiu estas resendata sendefekte. Livertempo minimume 4 semajnoj. Alsendo per rekomendita letero.

Ferna-Versand, Plauen i. Vogtl., Germ.

La Interŝanĝo
Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilitoj aperas sep fojoj jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj senditan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro,

Béziers (Hérault), Francujo,
3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Komercdomoj,
Komercistoj, Reprezentantoj
 uzu en via propra intereso la servojn de la
Komercista Esperanto Grupo
 Freiburg i. Br., Germ., Katharinenstr. 14
 kiu havas bonegajn rektajn rilatojn al
 gravaj germanaj firmoj kaj fabrikoj.
 Perado senkoste!

- ESP. EKSPozICIO. Fritz Michalek, Reichenberg, Lerchenfeldstr. 20, Ĉeĥoslovakio, kolektas kaj interŝanĝas por konstanta esp. ekspozicio ĉiusecajn esperantaĵojn, propagandilojn ktp.
- ANTVERPENO (Belgulo). — PENSIONO POR JUNULOJ. — Profesoro de ŝtata Mezgarda Instruado akceptas junulojn 10-18-jarajn, kiuj deziras studi ĉe Mezgarda lernejo, Athenée (Liceo), aŭ Supera Komercia Institut. Vasta moderna domo kun elektra lumo kaj banejo. Familia vivo. Regula kontrolado pri la studado. Modera prezoj. — E. Vincent, Cuperussstraat 17, Antwerpen.
- ATENTU! Estimataj redaktoroj kaj eldonistoj en ĉiuj landoj! Mi ne intencas vin ekspluati. La alvokoj estas oftaj: sed atentu la mian! Bonvolu sendi al mi po unu ekzempl. de ĉiuj Esp. gazetoj, libroj ktp. por la migranta ekspozicio en Estonio. Insistite mi petas malaltigi la prezojn de la sendaĵoj el bonvalutaj landoj. Rekompence vi ricevos ekzemplerojn de „Esperanto“, „Esp. Triumfonta“, „Esp. Finnlando“ aŭ aliajn gazetojn, aŭ monon. Sendu katalogojn! Referencoj: Konto ĉe UEA, „Esp. Triumfonta“ kaj „Esp. Finnlando“. — Adreso: Haapsalu, Estonio, J. Grünthal, pk. 15.
- FILATELISTOJ. Kontraŭ du svisaj frankoj aŭ samvaloro mi sendas rekomendite 60 malsamajn neuzitajn poŝtmarkojn de Meza Litovio. Prezareto kontraŭ unu respond-kuponon. S-o W. Kwieciński, str. Żelazna Chałka 50, Wilno, Meza Litovio.
- Korespondeo kaj Interŝanĝo.**
S-o Martin Tamverk, Karja 5, Haapsalu, Estonio, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl), poŝtmarkojn kaj ilustr. ĵurnalojn en ĉiu lingvo kun ĉiuj landoj.
S-o L. Jürisson, instruisto, Haapsalu, Saks 6, Estonio, interŝanĝas poŝtmarkojn de Eŭropo.
S-o Yrjö Ruohio, Finnlando, Viborgo, Waasank 25, „Hankkija“, interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.
21-jara muzikisto deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kaj leteroj; interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn kaj help-papemonon. — S-o Günther Jakob, Trebnitz i. Schl., Germ., Breltestr. 12.
Aleksandro Galunov, Petrograd, Rusio, Počtamskaja 16-18, loĝ. 17, deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr.
S-o Franz Mausfeld, Grottau 285, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi per poŝtkartojn ilustr. interŝanĝas poŝtmarkojn kaj monon kun ĉiuj landoj, esceptinte Germanion.

Kiam troviĝos suŝĉaj abonantoj, aperos malgranda revuo
La Mondo Politika.
 Jara abonkosto 3/6 ŝil., t. e. 14 resp.-kup. Ne sendu monon tuj, sed anoncu vin kiel abonanto.
 Oni invitas artikolojn nepagotajn. Bonvolu enmeti kuponon, se neceseas respondo.
Redaktoro,
4 Princeton St., London W. C. 1.

Lustroj el Kristal-vitro
 en ĉiuj stiloj kaj grandoj p. elektra aŭ ĝasa lumigado. Fabrikataj laŭ propraj kaj indikataj skizoj.
Ernst L. Hettichnach.
 Freiburg i. Br. (Germ., Rheinstr. 60).
 Eksperto al ĉiuj landoj.
 Kapablaj reprezentantoj ŝercataj.

SILKAJ BRODAĴOJ
REKTE EL ĤINUJO, LA SILKOLANDO!
 Esperanto-brodaĵo kun surskriboj esperantaj, verda stelo, globo ktp.
 Bibliaj brodaĵoj kun sanktaj tekstoj.
 15 : 20 aŭ 29 : 39 cm * dol. 2.50 aŭ 4.50.
 Brodaĵoj de birdoj, floroj, vidaĵoj ktp. samformataj kaj samprezaj.
 Specialaj laboroj laŭ modelo.
 Sendo per rekomendita letero.
 Dol. 1.00 = 10 stamp. respond.-kup. aŭ 3 ŝilingoj, poŝtmandatoj aŭ kambioj de Thos. Cook & Son.
 Specimeno kontraŭ 1 resp.-kup.
C. S. Gee,
 HAI-YEN (tra Shanghai), Ĥinujo.
 Korespondado en Esperanto!

Importo. Eksperto.
Pollanda Komercia Agentejo
 Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm. 10
 deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj eksterlandaj firmoj, speciale en teknikaj maŝinoj, manufakturo kaj galanteriaj artikoloj; donas ĉiujn informojn pri :: la polaj komerclokoj. ::
 Nur pograndaĵoj bonvolu sendi ofertojn kun specimenoj aŭ katalogo.
 Reprezentado. Perado.

Freiburger Kassenschrankfabrik
Karl Schuler
 Freiburg i. Br. (Germ.)
 Hugstetterstr. 8/8 a.
 Speciala Fabriko por monŝrankoj, libroŝrankoj, nepriŝteblaj ŝrankoj por dokumentaroj, sekretaj murŝrankoj kaj kasetoj.
 Eksperto al ĉiuj landoj.
 Oni petu specialan proponon.
 Reprezentantoj ŝercataj.

Komercistoj! Fabrikistoj!
 Nur via anonco en ET ne suŝĉas!
 Por atingi la intereseulojn, akiru en ĉiuj landoj interrilitojn, kiuj speciale altiras la atenton de samfakaj firmoj al via adreso!
 Por Hungarlando akceptas tiun laboron en intereso de la afero nur por repago de propraj elspezoj
 Hungara Esp. Servo, Hajos utca 15, Budapest VI.

Art-Amikoj,
 Artajo-, Bildo- kaj Libro-Vendistoj,
 kiuj havas intereson por belegaj akvareloj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstria, turnu sin al Sepp Osterer, Graz, Aŭstrio, Gleisdorfergasse 5.
 Favana okazo por eksterlandanoj pro la malalta valuto aŭstria.

Ekspozicio de Lerneja Materialo en Antwerpen (Belgulo).
 La Urbestro de Antverpeno decidis organizi baldaŭ ekspozicion de lerneja materialo. Ĉiuj Esperantistaj instruistoj aŭ aliaj fakuloj estas insiste petataj, havigi al nia Delegito de UEA, s-o Frans Schoofs, 45 Kleine Beerstraat, Antwerpen, ĉiujn utilajn aŭ interesajn informojn (fotografajojn, desegnaĵojn, katalogojn aŭ adresojn de fakaj firmoj ktp.)

Babcock-Wilcox
Akvotubo-Kaldronoj
 por normala kaj tre alta vaporigo estas fabrikataj de

FRATOJ STORK & K-io
HENGELO (O) NEDERLANDO
 : Fabriko kun pli ol 2000 laboristoj. :
 Esperanto korespondanta.
 Nur petoj de seriozaj firmoj estas konsiderataj.

Nova eksport-objekto! Aparta mur-ornamo!
Mur-bildojn
 garantie arte pentritajn per diversaj koloroj sur la interna vitroflanko, laŭ ĉiuj motivoj, en vere bela maniero (grandoj 6 : 9, 9 : 12 kaj 15 : 18 cm) fabrikas kaj eksportas ĉiulanden je mirige malaltaj prezoj
 Firmo Emil Weiler, arlaborejo por vitropentraĵoj, Freiburg i. Br., Germ., Emmendingerstr. 30.
 Kapablaj reprezentantoj dezirataj.

- S-o A. Kollamaa, Haapsalu, Kalda 31, Estonio, deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝas poŝtmarkojn.
- Estonio, Haapsalu, raadiojaam, John Vunk, telegrafisto de senfadena telegrafo, korespondas kaj interŝanĝas kun ĉiuj landoj ilustr. poŝtkartojn kun vidaĵoj de urboj, pri elektrotekniko kaj vojaĝo.
- Ludwig Wagner, ŝtatoŝtato, München (Bavario, Germ.) Isabellastr. 40, Vorderhaus, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr., leteroj, kaj interŝanĝi gazetojn, poŝt kaj sigelmorkojn ktp.
- Mi deziras korespondi kun Anglujo, Ameriko, Skandinavio kaj Japanujo. — Kiu interŝanĝas kun mi fotografajojn? Mi povas sendi bonajn sportfotojn, ankaŭ el filmoj. Otto Weselmann, Nordstr. 77-II, Düsseldorf, Germ.
- Max Spahn, Düsseldorf, Collenbachstr. 75, Germ., deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj (bfl.)
- Max Knüttel, bankoficisto, Oels i. Schl., Germ., Bankhaus Bielschowsky, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj. Mi interŝanĝas poŝtmarkojn kaj help-papemonon.
- Karl Niebsch, Oels i. Schl., Kronprinzenstr. 2, Germ., deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj; interŝanĝas poŝtmarkojn kaj help-papemonon.
- F-ino Erika Neuroth kaj s-o Richard Neuroth, 19-jara, Filrstenstr. 6-III, Breslau 9, Germ., deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kun la tuta mondo.
- S-o W. Ekert, Wilhelmshaven, Moltkestr. 5, Germ., deziras korespondi poŝtkarte kaj letere kun ĉiuj landoj.
- S-o Georg Garbe, Bremen, Riensbergerstr. 12, Germ., deziras korespondi per poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.
- S-o E. Friebe, instruisto, del. de UEA, Residenzstr. 24, Dresden-Dobritz, Germanlando, serĉas tiumondajn gekorespondemulojn per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj pri ĉiu temo. prefere pedagogia; donas komercajn informojn.
- F-ino Aranka Micey, Budapest, Grof Zichy Jenő u. 45-1-6, Hungario, korespondas kun ĉiulandanoj per ilustr. poŝtkartoj (pm. bildflanke).
- S-o Jung Janos, Telekhaz g. 5, Temesvar II, Rumanio, interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo kaj ilustr. poŝtkartojn.
- S-o Oskari Ruohio, Finnlando, Viborgo, K. Erik. L. puistik 11, interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.
- F-ino Isidro Nalls, str. Union 99, Salvador, Hisp., deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj.

- S-o Benjamin Nasielski, Varsovio (Pol.), Granleza 8, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn, leterojn kaj poŝtmarkojn; korespondas ankaŭ france.
- S-o Bruno Glaubig, Oels, Silezio, Wartenbergerstr., Germ., deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn, leterojn, fotografajojn kaj monojn kun ĉiuj landoj.
- S-o Erich Hoffmann, instruisto, 21-jara, Oels, Silezio, Germ., Billicherstr. 3-1, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn, leterojn, fotografajojn kaj monojn kun ĉiuj landoj.
- F-ino Hildegard Hoffmann, liceanino, 17-jara, Oberglauche Kr. Trebnitz, Germ., deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn, leterojn, fotografajojn kaj monojn kun ĉiuj landoj.
- S-o Chajm Fajn en Jonava, Kauno apsk., Litovio, deziras korespondi kun samideanoj de ĉiuj landoj kaj pri ĉiu temo.
- Studentoj de Omska Pedagogia Teknikumo deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj. Adreso: Kostelnaja 11, por Esperantistoj, Omsk, Siberio.
- S-o V. V. Varankin, Niŝni-Novgorod, Rusio, Studenaja 55, deziras korespondi kun ĉiulandanoj.
- S-o Henriko Ekstein, Varsovio (Pol.), Leszno 22, deziras korespondi pri diversaj temoj (filozofiaj, literatura) kaj interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiulandaj gesamideanoj. Korespondas ankaŭ france aŭ germane.
- Radiotelegrafistoj, kiuj deziras korespondi kun samfakuloj en Ameriko, sin turnu al s-o J. D. Sayers, Care Evening Post, 20 Vesey Street, New York City, U.S.A.
- S-o Vitold Tenisov, Siberio, urbo Barnaul, Pavlovskaja 82, korespondas pri natursciencoj kaj diversaj temoj; kolektas poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn ilustritajn.
- S-o pastro Serĉiev el Siberio korespondas pri pedagogiaj demandoj kun geinstruistoj kaj gelnantoj el la tuta mondo; interŝanĝas lerneajn fotojn, albumojn, infanajn kartojn kaj desegnaĵojn, angla-, franca-, germanlingvajn ilustritajn librojn pri eksterlandaj kaj enlandaj edukado.
- S-o Japanujo, Tokio, Shiba Post-Office; P. O. Box 9. Al Serĉiev.
- S-o Petro Sery-Sirik petas komuniki al li laŭ adreso: Siberio, Vladivostok, Daine-Vostoĉnij Institutu, por s-o Sery-Sirik, la adresojn de patrino kaj fratino de lia edzino Natalio Aleksandrovna; ŝia patrino Natalio Mihajlovna Taube loĝis en 1919 en urbo Verneudinsk, Barnaula str. 70; ŝia frato Aleksandro Mihajloviĉ Ĥigorov loĝis en Petrograd, Jamskaja str. 5 kaj havis oficon ĉe Financa Ministerio.